


La asturaj aŭtoroj el kies verkaro oni prenis materialon por la libro en Esperanto: “Astura Bukedo”: Ramón de Campoamor, Ramón Pérez de Ayala, Ángel González, Armando Palacio Valdés kaj Leopoldo Alas (Clarín)

kutima agado. Estis alia kurso de Esperanto en Radio Navia, kaj same daŭris la Esperanta instruado ĉe la grupo **ANTAŬEN** de Avilés. En Gijón, en kunsido de la estraro de **A.E.A.** de la 18an de septembro oni decidis ke la 19an de oktobro komenciĝu kurso de Esperanto gvidata de Julio Argüelles, Faustino Castaño kaj Santiago Mulas. Menciindas ke tiujare Adonis G. Meana grave malsaniĝis; li devis resti dum dekduo da tagoj en hospitalo kaŭze de hidrocefalo el kiu originis iskemio, kio malfortigis lian dekstran kruron kaj sekve de tio li restis lama. Sed kvankam li ne plu povis okupiĝi pri kursgvidado, tamen li daŭre verkis siajn kutimajn kunlaboraĵojn por **HELECO**.

Rilate al la revuo, pri kies ellaborado daŭre okupiĝis tiam Ildefonso Domínguez, en la estrarkunsido de 12a de novembro oni decidis ke iu tri-persona komisiono dediĉiĝu al la kontrolo de la publikigenda materialo. La grupanoj elektitaj por tiu komisiono estis: Santiago Mulas, Adonis G. Meana kaj F. Castaño.



Bulgara samideanino vizitas nian E-grupon

Ankaŭ tiujare nia E-grupo ricevis viziton de landaj kaj fremdaj gesamideanoj. Komence de monato februaro venis iu bulgara samideanino, Bojana Prodanova. Gelernantoj de la tiama E-kurso de nia Asocio povis pratiki Esperantan paroladon kun eksterlandanino kiu lerte superregis la lingvon. Sur ĉi paĝo ni prezentas foton de vizito de tiu ino al nia ejo. Aliaj vizitantoj estis Luis Serrano kaj ties edzino, kiuj venis somere al nia urbo. Tiel li kiel samideanino Prodanova verkis poste, por publikigo en **HELECO**, artikolojn raportante ties vizitojn.

Alia esperantista vizito, okazinta en monato marto, estis iome ekstertipa, kaj pri ĝi okupiĝis ankaŭ la presaro, tiel la urba kiel la regiona. Temis pri tri esperantistaj biciklantoj aŭ biciklistoj kiuj, portante esperantistan propagandon sur iliajn bicikl-istaj kostumoj, pasis tra nia urbo destine al Varsovio por partopreni tie en la Jubilea **Universala Kongreso de Esperanto**. La biciklanta grupo, kiu esperis pliampleksiĝi per la aldoniĝo de pliaj bicilk-veturantaj samideanoj survoje al Polujo, estis gvidita de Georges Comte “Jorgos”, kiu estis intervjuita de kelkaj asturaj ĵurnaloj, rolante kiel interpretistoj Santiago Mulas kaj Adonis G. Meana.

La esperantista festo de tiu Jubileo Jaro estis en nia urbo la 13an de decembro simile splende kiel la antaŭaj jaroj. La afero komenciĝis, kiel kutime, en la strato Esperanto, kie la movadanoj kunestis por la protokola akto de surmetado de florbukedoj apud la nomtabuloj de la strato. Sekvis poste, en la teatrejo de la Katedro Jovellanos, parolado de samideano Alcibiades González Meana pri la temo “En la unua centjaro de Esperanto”. La prelego estis en la hispana lingvo por la neesperantista publiko kiu ĉeestis la akton. Post spektaklo de kantado kaj dancado far de “Gijon Arta Grupo”, la festantaj gesamideanoj ĝuis fratan bankedon en iu restoracio de la urbo.